nia voĉo

madrida esperanto-liceo oktobro 2011

## MALFERMA KUNVENO DE MEL

La 26an de septembro okazis malferma kunsido de MEL, por pritrakti venontajn agadojn kaj iniciatojn en Madrido, dum venonta jarkvarono kaj dum sekva jaro.

Oni konfirmis la pluan kunvenadon de liceanoj en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro ĉiujn lundojn vespere, kiel tradicie.

Oni krome akceptis la ideon de diversaj samideanoj kunveni ekster la sidejo unu aŭ du fojojn monate, por babili kaj praktiki la lingvojn, kaj por organizi aliajn aktivadojn. Estis subtenata la propono de Pedro Hernández, organizi babilrondon la unuan sabaton de ĉiu monato, je la kvina posttagmeze, en kafejo. Momente, tiu loko estos la supra etaĝo de centra kafejo "4D Copa y Café", strato Cruz 28, stratangule al placo Jacinto Benavente.

Krome, oni klopodos organizi aranĝojn krom babilado: ekskursojn, manĝojn, prelegojn, kursetojn pri niaj hobioj kaj fakoj, urbovizitadojn, ktp. La konkretaj agadoj estos deciditaj en ĉiu monato kaj anoncataj en la kutimaj forumoj.

Oni ankaŭ esploros la eblecojn organizi prelegojn en kulturaj centroj. Ideale estus trovi daŭran lokon, kvankam ĉeestantoj konsciis ke konstanta programado tre probable ne estos akceptata de respondeculoj de la centroj. Tamen, ni almenaŭ serĉos lokon por sporadaj disvastigaj paroladoj, kaj ankaŭ por eksteraj ĉeestaj kursoj.

Specialan atenton meritas la estontaj agadoj por la jaro 2012, ĉar en tiu periodo okazos du gravaj datrevenoj. Internacie, ni festos la 125-an datrevenon de la naskiĝo de Esperanto, t.e. la publikigado de la Unua Libro, en julio 1887. Loke, ni festos la 50-an datrevenon de la kreado de Madrida Esperanto-Liceo, en ĝia nuna formo kaj kun tiu nomo. Ni diskutis diversajn ideojn, kiujn ni konkretigos dum venontaj monatoj, kaj por kiuj oni petos ĉies ideojn kaj kunlaboron.

Ni komentis ankaŭ pri la organizado de venonta Zamenhof-festo en Madrido. Oni decidis sekvi la modelon de la pasinta jaro: ampleksa distra kaj kultura programo, kun memserva manĝado en iu privata ejo. Ĝi okazos dum la semajnfino de la 17a kaj 18a de decembro (ni ankoraŭ devas konfirmi la precizan daton, laŭ la disponebleco de la ĉeestontoj), tre probable en la sama ludejo *da2*, en kvartalo Villaverde. Dum venontaj semajnoj ni precizigos la enhavon kaj konkretajn datumojn. Volontuloj kun ideoj kaj laboremo anoncu sin ĉe la adreso de MEL aŭ dum venontaj renkontiĝoj.

## MADRIDA PROGRAMO

La oktobra kunveno en kafejo 4D okazos escepte ne la unuan sabaton, sed la duan. Do, memoru: la 8an je la 5a vespere vi havas rendevuon. Krom la cititajn programojn kaj ideojn, notu jenajn datojn por specialaj kunvokoj en la sidejo de Liceo:

- 24a de oktobro, lundo. 18,30: "Rokaj montaroj de Kanado", fotografaĵoj komentitaj de Lupe kaj Carmen
- 21a de novembro, lundo. 18,30: "Aŭtuno en Nov-Jorko", fotografaĵoj komentitaj de Lupe.
- Dato konfirmota: Nederlando kaj vizito al Centra Oficejo de UEA; Manolo Parra.

Sciante ke Madrida E-Liceo emas foje organizi ekskursojn, Darío sugestis al MEL la eblecon ekskursi al Leono por vidi la ekspozicion aŭ eventon "Amikejo", kiu funkcias en kvar etapoj ekde komenco de tiu ĉi jaro. Nun okazas la kvara kaj lasta, eble ĝis jarfino. MEL-estraro akceptis la sugeston kaj esploros ties plenumeblecon.

## VIZITIS NIN

Dum monato septembro ni ĝuis kelkajn bonajn ŝancojn rendevui en Madrido kun eksterlandaj samideanoj vizitantaj nian urbon.

Dum kelkaj tagoj gastis tie ĉi la pollanda samideano Kasia Idziaszczyk, kun kiu kelkaj madridanoj kuntrinkis la 18an vespere.

En du etapoj vizitis Madridon japania samideano Tsukuro Harada. Li ankaŭ pasigis kelkajn tagojn en Ekstremaduro; dum unu el tiuj tagoj li partoprenis manifestacion ĉe la nuklecentralo Almaraz, dum kiu li rakontis pri lastatempaj okazaĵoj en Fukuŝimo, kio vekis atenton de kelkaj amaskomunikiloj. La 24an de septembro vespere oni organizis babilrondon por profiti lian partoprenon. Ankaŭ ĉeestis Brandon Sowers, usona esperantisto, kiu restos en Madrido pro laboraj kaŭzoj dum pluaj dek monatoj. Konsiderante jam loĝantaj tie ĉi eksterhispaniaj samideanoj, la kunvenon ĉeestis homoj el kvin landoj kaj tri kontinentoj.

## EŬROPA TAGO DE LA LINGVOJ

La 26a de septembro estis festata jam dekafoje la Eŭropa Tago de la Lingvoj, kreita laŭ iniciato de la Konsilio de Eŭropo kun la apogo de la Eŭropa Unio. Diversaj institucioj kaj asocioj organizis agadojn favore al lingva diverseco en Eŭropo, inter kiuj kelkaj Esperanto-organizaĵoj. Tamen, la reeĥo kaj la iniciatemo estis ĉijare ne tre granda, kaj specife en Hispanio tre malmultaj asocioj montris substrekindajn aktivaĵojn.

## E-EVENTOJ EN HISPANIO KAJ LA MONDO




La 19a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo okazos de la 1a ĝis la 8a Oktobro 2011, en la Hotelo Cartago Nova, en Malgrat de Mar (Maresme, provinco Barcelono)

De la 21a ĝis la 23a de oktobro de 2011 okazos la 16a Andaluzia Kongreso en Sevilo. Ĉijare oni festos la centjaran datrevenon de Sevila Esperanto-Asocio, fondita de Trinidad Soriano en la jaro 1911. Dum la kongreso oni prezentos la libron "Cien Años de Esperanto en Sevilla" (Cent jaroj de Esperanto en Sevilo) kaj Jorge Camacho prelegos pri poezio. Ankaŭ oni organizos kurson de Esperanto kaj vizitos diversajn partojn de la urbo.

La 35a Kataluna Kongreso de Esperanto okazos en Barcelono de la 28a ĝis la 31a Oktobro 2011, organizata de Kataluna E-Asocio.

La muzika festivalo *"Periferias"*, kiu okazos en la aragona urbo Huesca (Osko), fine de oktobro, invitis du esperantistajn artistojn partopreni en ĝi. La 29an kantos Martin Wiese, eksa kantisto de la grupo "Persone", kaj kiu antaŭnelonge eldonis albumon "Pli ol nenio". La antaŭan tagon ludos la diskĵokeo Roger Borges, brazilano loĝanta en Hispanio. Vidu informojn en http://www.periferias.org/

La 26an de novembro okazos la tradicia "Malferma tago" de UEA en Roterdamo (Nederlando).

Pri aliaj novaĵoj en Madrido kaj la mondo, atentu la diskonigojn en la retforumo pri Esperanto en Madrido http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com